

Esperanto kaj Interlingua, 4-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 713, 1977.06.08 & 10 & 11

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ni daŭrigas la prezentadon de la 170-paĝa eseo 'Esperanto aŭ Interlingua' aperonta en la kolekto Studoj de Kultura Centro Esperantista, legante al vi erojn el resumo, kiun mem verkis la aŭtoro Edo Bernasconi. Ni atentigas vin, ke tiu ĉi resumo aperis en francigo en la sama kolekto Studoj sub la titolo 'Esperanto et Interlingua. Brève étude comparative'.

A.- Jen ni cite legas al vi el ĉapitro titolita 'La ideologiaj premisoj de Esperanto':

Cl.- Iusence ni povus titoli ĉi tiun ĉapitreton Kial Esperanto venkis ? Zamenhof, kaj la ceteraj aŭtonomlingvaj planlingvistoj, celis konstrui lingvon demokratian. Lerni lingvon estas ĉiam malfacile, ĉar de unu lingvo al la alia ofte la kategorioj ŝanĝiĝas, kaj ni ne plu scias trovi nin. Ekzemple, tute certe rusoj havas malfacilaĵon lerni la kategorion artikolo, ĉar io tia en la rusa ne ekzistas. Tie kuŝas la malfacilaĵo por rusoj. Sed tiu malfacilaĵo ne estas evitebla, almenaŭ grandparte.

A.- Tio, kio estas evitebla, estas la fakto, ke al unusola kategorio respondu pluraj vortoj. Ekzemple, kiam rusoj lernas finfine la kategorion determina artikolo, en Esperanto li havas nur unu vorton : 'la', dum en la itala li devas ankoraŭ scii selekti inter 'il', 'lo', 'la', 'l', 'i', 'gli', 'le'. Aŭ se ĉino lernas la kategorion pluralo, en Esperanto li trovos nur unu finaĵon, -j, sed en la skribita franca lingvo li devos ankoraŭ scii selekti inter : nenio → ekzemple corps, -s → ils, -x → choux, -aux → chevaux, émaux, -ent → ils parlent, kaj tiel plu.

Cl.- Sed se ordon oni povas meti en la gramatikon, oni povas ĝin meti ankaŭ en la vortformadon ! Tio estis la genia malkovro de Zamenhof. Li analizis la vortojn, kiujn li volis enkonduki en sian lingvon, kaj li malkovris, ke ekzistas vorto-familioj, tio estas, ke ekzistas rilatoj inter diversaj vortoj, kiujn ni povas esprimi unuece. Ekzemple, en la franca kaj itala lingvoj la rilato inter la kvalita adjektivo kaj la koresponda abstrakta substantivo estas ofte kaosa. Oni ja diras:

saint - sainteté per finaĵo -eté ; ivre - ivresse, per finaĵo -esse ; haut - altitude, per finaĵo -itude kaj modifo de la baza adjektivo ; vrai - vérité, per finaĵo -ité kaj modifo de la baza adjektivo ; franc - franchise, per finaĵo -ise.

A.- Zamenhof prenis la sufikson -eco, kaj ĝin regule algluas al ĉiuj kvalitaj adjektivoj por indiki ties transformon al abstraktaj substantivoj:

sankta - sankteco; ebria - ebrieco; alta - alteco; vera - vereco; sincera - sincereco, kaj tiel plu.

Cl.- Nun ni povas ekspliki, kial tiu skolo nomiĝas lingvo-aŭtonoma: laŭ ĝi la vortoj devas konstruiĝi sendepende de la formo, kiun ili havas en la naciaj lingvoj (ĉu en la germana oni uzas la sufiksojn -heit - Neuheit, -keit - Natürlichkeit, aŭ -e - Grösse, aŭ ĉu en la franca la menciitajn -eté, -esse, -itude, -ité, -ise, estas egale. En Esperanto oni uzos ĉiam -eco, por la germanaj ekzemploj: nov-eco, nature-eco, grandeco.

A.- La homoj, kiuj uzas Esperanton, povas esti unulingvuloj: gravas nur, ke ili sciu la bazajn radikojn, kaj konu la afiksojn. Ĉio cetera - tio estas : la gramatiko kaj la vortokonstruo, estas aŭtomata, aŭtonoma, dependa nur de lingvo-internaj reguloj, finfine: de la senco.

Cl.- Tio kondukis al du rezultoj. Unue: la laŭsencaj vortfamilioj iĝis tute regulaj. Do en Esperanto-vortaro troviĝas nur radikoj kaj afiksoj : sufiksoj, prefiksoj. Pro tio la lernanto ŝparas lerno-tempon kaj lerno-laboron, kaj atingas rapidan progreson en la parolo kaj en la skribo. Due: la malregulaĵoj malaperas. La radikoj estas ĉiam konstante samformaj. Ekzemple, radiko-ŝanĝiĝoj kiel la sekvaj estas neblaj en Esperanto. La franca vrai (vera) formas vraisemblable (versimila), sed vérité (vereco). En la franca la verbo 'faire' kun alturno de 5 radikoj : fe - faire, je fais / fari, mi faras ; fo - nous ferons / ni faros ; foz - je faisais / mi faris ; fi - il fit / li faris ; fas - que je fasse / ke mi faru.

A.- La venontan semajnon ni daŭrigos la prezentadon de la kompara studo Esperanto aŭ Interlingua de Edo Bernasconi. Prelegis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012